*Aperis en: GrKG/H 43/3, sep. 2002, p. 139*

**Protokolo de la Ĝenerala Asembleo de AIS dum SUS 25,** okazinta je 2002-09-07, 11:30 – 12:30 h, en la aŭlo de la hungara gimnazio, Komármo (SK).

## *1 Formalaĵoj*

La prezidanto de AIS, OProf. Dr. habil. Helmar Frank, malfermas la kunsidon. Ĉeestas la efektivaj membroj Angstl, Fössmeier, Frank, Holdgrün, Lobin, Minnaja, Pennacchietti, Poláková kaj Quednau, reprezentante ankaŭ aliajn efektivajn membrojn, kiuj estas delegintaj siajn voĉojn. La kvorumeco ne estas pridubata. La protokolon faros OProf. Reinhard Fössmeier. La tagordo estas tiu publikigita sur la dorsa kovrilo de la SUS-programo. Krom efektivaj membroj ĉeestas ADoc. Dr. Eugen Macko kaj pluraj aliaj SUS-anoj; la ĜA decidas doni al ĉiuj la ĉeestrajton.

## *2 Ĝenerala raporto de la Senato*

Jam okazis, senpere antaŭe, raporto dum la Solena Fermo de SUS 25, kiun ĉiuj efektivaj membroj ĉeestis.

## *3 Financa raporto, senŝarĝigo, buĝeto.*

La (ne ĉeestanta) trezoristo ankoraŭ ne prezentis financan raporton kaj buĝeton; tial ne eblas senŝarĝigi la Senaton. La prezidanto proponas dissendi raporton kaj buĝeton kun la jarfina cirkulero. La propono estas unuanime akceptita.

## *4 Decidoj*

44.1 La Senato proponas, okazigi BUS 4, kiu ne povis okazi en printempo, anstataŭe fine de septembro en Bydgoszcz, ĉar tie estas kandidatoj per bakaaŭriĝo. La ĜA unuanime akceptas.

4.2 La Senato petas aprobon de la decido, allasi dum SUS 25 studenton al la finekzameno, kvankam unu mankantan studunuon li povos akiri nur unu tagon post la ckzameno. La ĜA unuanime akceptas.

4.3 La Senato proponas al la ĜA konstati, ke ĝi celis rcspekti por la nuna senata deĵorperiodo la artikolon 10.3 de la Statutapendico, laŭ kiu la sumo de la nombroj de la senatanoj elektitaj kaj de la vicsenatanoj estu 11. Pro tio ke ekestis duboj pri la formala korekteco de la elekto de la tria vicsenatano, la ĜA nun por la resto de ĉi tiu deĵorperiodo aŭ elektas OProf. Bociort por ĉi tiu rolo aŭ konfirmas lian jam okazintan elektiĝon. La ĜA tion unuanime akceptas.

4.4 La prezidanto proponas al la ĜA

a) *konstati*, ke AIS estas ja jure fondita en la RSM (sekve al la registara decido n-ro 58/3422 okazinta 1983-05-19) kaj tial konservadas en sia nomo la nomon de sia fondoŝtato sed laboras propraaŭtoritate ankaŭ eksterlande, sendepende de direktivoj de ajna registara institucio

b) *insisti* pri la konservado kvankam aktualigenda de sia jura ekzisto en la RSM

c) *esprimi* la deziron de kroma enkorpiĝo de la Akademio en fakultatojn de jure kaj mure ekzistantaj aŭ ekzistontaj universitatoj ankaŭ ekster la RSM kaj tiucele subteni la klopodojn starigi tian fakultaton en la Lucian-Blaga-Universitato Sibiu-Hermannstadt kaj fondi universitaton en Komarno

d) *aprobi* la intencon de la fondantoj de la universitato en Komárno, komenci per tri konstantaj fakultatoj (konforme al la statutpropono de 2002-05-11), kies fondoprezidantoj estu la prezidanto de AIS, la nun plenrajta AlSanino OProf. Eva Poláková kaj Senatano OProf. Fabrizio Pennacchietti, kaj deklari kiel fondorektoron rektoran triopon konsistantan el OProf. Selten, OProf. Frank kaj Docento Szabo István ISK; krome la ĜA rekomendu kiel fondokancelieron OProf. Eva Poláková.

La ĜA akceptas la proponojn a kaj b unuanime, la proponojn c kaj d kun po 5 sindetenoj.

## *5 – 6 Kromaj decidoj kaj elektoj*

Kromaj tagordaj punktoj deciditaj dum TOP 1 ne estas. Elektoj ne okazis.

## *7 Diversaĵoj*

La prezidanto raportas, ke ADoc. Mag. Joanna Lewoc demisias kiel Senata Sekretario kaj kiel asistanto de la ekzamenofico. La ĜA esprimas sian bedaŭron pro tiu decido de ADoc. Lewoc kaj sincere dankas al ŝi pro ŝia multjara kunlaboro, kiu estis esenca por la agado de AIS.

Komarno, la 7an de septembro 2002.

Protokolis: *Reinhard Fössmeier*